



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Tradukado de la gvidlibroj

Ekde marto ni tradukas gvidlibron "Brno-gvidlibro tra la urbo". Bedaŭrinde la Turisma informcentro ĝin pro financaj kialoj ne eldonos. Tamen ili proponis al ni, ke ili por ni senpage preparus novan eldonon la de malgranda gvidilo. Kelkaj tekstoj ŝanĝiĝis kaj estas bezonata nova traduko. Do ni precipe traktos tiun ĝisdatigon kaj, se restos la tempo, ni pritraktos la tradukon de la pli granda gvidlibro.

Se vi havas nove tradukitajn tekson por "Brno-gvidlibro tra la urbo", mi petas vin, ke vi sendu ilin al mi ĝis mardo. Se vi volas ricevi tekstojn por la malgranda gvidilo antaŭ la renkontiĝo kaj vi planas veni, bonvolu skribu al mi. Mi intence ne sendas la labormaterialojn al ĉiuj brnanoj.

Gvidos: Milan Kolka

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 13an de novembro 2024 je la 18.00-a h (la klubejo estos malfermita ekde 17.45)

Kie: Občanský klub, [Hybešova 65a](#), Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la [mapon](#). La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)



Ni rekomendas

- la 14an de decembro 2024 [Zamenhofa tago, Vieno](#)
- La 5an — 13an de julio 2025 [59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj](#) (Kaunas, Litovio)
- **Kaj precipe ni rekomendas UK 2025, kiu okazos en Brno! Se vi volas feliĉi, ne hezitu aliĝi ĝis fino de novembro, kiam finiĝos la unua, la plej malmulte kosta aliĝperiodo.**



Cetera programo en novembro

La 20-an **Verdaĵoj** – Mirka Tomečková, rete per Skajpo

la 27-an **Amuzu, lernu, ridu** – Josef Vojáček, klubejo

Programo en decembro

la 4-an **Přemysl Pitter** – Petr Chrdle, komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice, rete per Zoom

la 11-an **Antaŭkristnaska renkontiĝo**, klubejo

La 18-an *Ankoraŭ ne agordita*, rete per Skajpo

Mi petas vin, ke vi jam primensu programon por januaro kaj februaro. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Koran dankon.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/@esperantobrna) (<https://www.youtube.com/@esperantobrna>).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrna.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra truo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)